

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1999:5-6



2000

*survoje al internacia lingvo
en la tria jarmilo*

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Decembro 1999/Januaro 2000 • 87-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:

Jan Setréus

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utförning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck AB, Stockholm

Prenumeration 1999: 180 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i
medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3,
Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se
www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1999:

Direktansluten medlem 180 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 90 kr. Medlemmar under
30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund.
Hel familj 270 kr (Inkl. 1 ex. av *La Espero*. Tilläggsex.
kostar 90 kr).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10


Postgiro: 578-5

Hemsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manusstopp den 15/2
Manus till La Espero
sänds till Jan Setréus
Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden
(tel./fax 08 - 717 75 67
e-post jan.setreus@spray.se)

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

NI PREZENTAS



Kjell

Mi ĉiam strebis esti avangardisto kaj viziulo. Kiam mi la unuan fojon aŭskultis radioprogramon, ke suĉinfanonaĝado evoluigas la individuon 5-6 fojojn pli rapide intelekte, senteme kaj motore, mi senhezite decidis partopreni en kurso por gepatroj de suĉinfanoj.

Tiatempe 1980 la suĉinfanonaĝado ne estis populara ne eĉ konata en Svedio. Nur en la plej suda provinco Skanio estis entuziasmulo Birger Buhre sportjurnalisto ĉe *Sydsvenska Dagbladet* en Malmö, kiu komencis instrui gepatrojn de suĉinfanoj. Mi decidis partopreni kaj neniam pentis aŭ hezitis spite de la granda kontraŭstaro de parencoj, infanejoj, lernejoj kaj aliaj "ekspertoj".

Estis la samo pri la vegetarismo. Mi strebis kaj batalis kaj ofte mi situas meze en minoritato por novaj ideoj. Nuntempe estas por mi normale kaj nature. Kompreneble mi ankaŭ strebas por enkonduki nian lingvon en gimnaziojn en Svedio.

112 jaroj ne estas multe por lingvo kaj mi estas konvinkita, ke la junuloj kaj esperanto apartenas al la estonteco kaj ke la estonteco komenciĝis antaŭhieraŭ.

La estraro de la sveda sekcio de KELI

Prezidanto:

Karl Buremo, Ekhagsringen 22 II,
554 56 Jönköping, tel. 036 - 17 44 66

Kasisto:

Arne Lundkvist, Kyrkogatan 28,
331 31 Värnamo, tel. 0370 - 139 08

Sekretario:

Agneta Järnlström, Vidargatan 49,
195 52 Märsta, tel. 08 - 591 225 07

Estraranoj:

Stig Kinnander, Ringvägen 2 B, 543
32 Tibro, tel. 0504 - 103 88
Birger Viggen, Rehmsgatan 16 III, 113
57 Stockholm, tel. 08 - 612 58 51

Nia agado 2000

Semajnfina aranĝo en Jönköping la 25-26-an de marto

Kiel argumenti por Esperanto hodiaŭ? Kiuj en la sveda socio estas la plej persvadindaj? Ni devas adapti nian agadon al la ideoj kaj tendencoj, kiuj regas ĝuste nuntempe.

Por diskuti tiujn demandojn SEF iniciatis semajnfinan aranĝon en Jönköping la 25-an kaj 26-an de marto.

La Sveda Esperanto-Instituto, SEF, SEJU kaj ILEI estas la unuaj invitantoj kaj ni atendas ke la aliaj svedaj esperantoorganizoj baldaŭ viciĝos inter la invitantoj, ĉar la demandoj supre ja koncernas ĉiujn esperantistojn en Svedio.

La ideo pri tia aranĝo aperis, kiam Bertil Nilsson (prezidanto de Eldona Societo) kaj mi (prezidanto de SEF) kunsidis iom post la Berlina kongreso,

por tradiskuti komunajn interesojn pri novaj membroj kaj librovendado.

Por pli vaste diskuti kaj plani aranĝon, ok personoj kunsidis fine de novembro, kaj ni venis al la konkludo ke la aranĝo okazu en Jönköping fine de marto. Partoprenis Bertil Nilsson, Håkan Lundberg (SEJU), Bengt Nordlöf (SEF, Esperanto-Gården), Anita Dagnarsdotter (Esperantoklubo de Stokholmo kaj verkinto de artikolo en *La Espero* pri simila aranĝo), Magnus Persson (klubo de Uppsala), Anita Bergh kaj Kaisa Hansen (klubo de Upplands Väsby) kaj Roland Lindblom (SEF).

Detalojn pri tempoj, kostoj k.t.p. ni sendos letere al kluboj kaj enmiksitaj organizoj.

Roland Lindblom

Examen

Svenska Esperantoinstitutets skrivningar för högre och lägre examen äger rum 16 april 2000.

Information:

Ebbe Vilborg
Prästgårdsängen 2
412 71 Göteborg
Tel. 031 - 40 52 74

SEF-kongress i Helsingborg 2000



**Helsingborg 20 - 21 Majo
2000**

När och var

20 - 21 maj. Troligtvis på den numera legendariska Olympiaskolan där allting började för tre år sedan, mitt emot fotbollsstadion med samma namn.

Tema för kongressen

Tema för "jubileumskongressen-2000" kommer att vara "Esperanto på gymnasiet". Men allting är bara preliminärt. Dock mottages redan nu anmälningar av värdklubben Aktiva tel. 042 - 15 59 69.

Gästtalare

Som gästtalare har rektorn för Olympiaskolan, Leif Andersson, lovat att ställa upp. Leif Andersson har bl.a. gjort sig känd som förespråkare för elevdemokrati och Olympiaskolan är en av de endast 14 gymnasieskolorna i Sverige där man tillämpar elevdemokrati.

El "La duonpreta ĉielo"

Kvin poeziaĵoj de Tomas Tranströmer

Ĉiun jaron, kiam la Nobelpremio pri literaturo estas anoncota, ĵurnalistoj kolektiĝas ekster la domo de Tomas Tranströmer en Västerås atende, ke li estu elektita. Li estas kaj en Svedio kaj eksterlande pritraktata kiel la sveda poeto, kiu plej meritis tian honorigon. Ĉi-paĝe aperas kvin el liaj poeziaĵoj, ĉiuj el lia kolekto "La duonpreta ĉielo" (Den halv-färdiga himlen), kiu aperis en 1962.

Ĉi printempe tiu kolekto aperos en esperanta traduko farita de Franko Luin. Per tio esperanto aldoniĝos al la 48 lingvoj al kiuj verkoj de Tomas Tranströmer jam estas tradukitaj.

La tradukoj kaj aperigo okazas kun la rajtigo de la aŭtoro.

La paro

Ili estingas la lampon kaj ĝia blanka kloŝo trembrilas dum momento antaŭ ol ĝi dissolvlas sin kiel tablojdo en glaso da malhelo. Sin levas poste. La hotelvandoj puŝiĝas supren en la ĉielmalhelon.

Kvietas jam l'amoraj movoj kaj ili dormas, sed iliaj pensoj plej sekretaj renkontiĝas kiel du koloroj, kiuj renkonte kunfluas unu en alian sur malseka papero de lernejana desegnaĵo.

Malhelas kaj kvietas. Sed la urbo pliproksimas ĉinokte. Kun fermitaj fenestroj. La domoj venis. Ili staras atende kunpremitaj tre proksimaj, popolamaso kun senesprimaj vizaĝoj.

Vizaĝo al vizaĝo

En februaro ĉio vivanta haltiĝis. La birdoj malvole flugis kaj l'animo alskrapis la pejzaĝon kiel boato skrapanta la kajponton, al kiu ĝi estas ligita.

La arboj staris dorsoflanke al ni. La neĝalto mezuriĝis laŭ mortaj tigoj. La piedspuroj maljunis sur la neĝokrusto. Sub baŝaro degelis la lingvo.

Iun tagon alvenis io al fenestro. La laboro haltiĝis, mi alrigardis. Brulis la koloroj. Ĉio turniĝis. La grundo kaj mi eksaltis renkonten.

La arbo kaj la nuboj

Arbo ĉirkaŭiras en la pluvo, nin preterkuras en la torenta grizo. Taskon ĝi havas. Ĝi ĉerpas vivon el la pluvo kiel la merlo en fruktĝardeno.

Kiam ĉesiĝas la pluvo, haltas la arbo. Rekta ĝi aperas, kvieta en helaj noktoj, atendas kiel ni la momenton, kiam la neĝflokaj ekfloros en la spaco.


Tra la arbaro

Loko nomata la marĉo de Jakobo estas la kelo de l'somera tago kie la lumo acidiĝas al trinkaĵo gustanta maljunon kaj slumon.

La senfortaj gigantoj staras dense implikitaj tiel ke nenio falas. La rompita betulo humiĝas tie en stara pozicio kiel dogmo.

El l'arbara fundo mi levas min. Heliĝas inter la trunkoj. Pluvas sur miajn tegmentojn. Mi estas impresplutubo.

Arbarlime l'aero varmetas. Granda piceo, turnita kaj malhela kies buŝo kaŝe en la tera humo trinkas ombron de ia pluvo.



La sonoro

Kaj la merlo blovis per sia kanto sur la ostojn de l'mortintoj. Ni staris sub arbo kaj sentis la tempon droni droni. La tomba kaj lerneja kortoj renkontis kaj vastiĝis sin unu en alian kiel du kurentoj en maron.

La sono de la preĝejaj sonoriloj levis sin portata de la mildaj leviloj de glisilo. Ili postlasis pli profundan silenton sur la tero kaj trankvilajn arbopaŝojn, trankvilajn arbopaŝojn.

Skolforum

Dum la granda ekspozicio por la eduka mondo, Skolforum, SEF partoprenis per stando inter la 1-a kaj 4-a de oktobro por la kvara fojo. Denove instruistoj vidis almenaŭ la vorton Esperanto, ke ni ankoraŭ estas aktivaj. Certe tridek mil inkluzive studentoj preterpasis en la granda halo de la foirdomo de Älvsjö. Ĉi-foje la deĵorantoj en la stando disdonis al scivolemuloj t.n. lingvoteston destinitan al EU-parlamentanoj. Ĝi estis jam sendita al la svedaj parlamentanoj en Eŭropa Unio. La demando estas "kiel multe vi povas kompreni de Esperantaj vortoj kaj frazoj sen studado de la lingvo". La broŝuro samtempe donas trarigardon de la reguloj.

Krome okazis interesaj diskutoj kun la trapasantoj. SEF eĉ vendis 75 novajn ŝlosilojn. Estas grave, ke SEF daŭre partoprenas en tiu eduka mondo.

(El La Veka Bulteno 3/1999)

Esperanto i Lerum

Jag är språklärare på Lerums Gymnasium – undervisar i italienska, engelska och tyska. Jag har länge varit intresserad av esperanto – har haft postens lilla publikation "Korespondu Esperante" stående på min hylla utan att kunna läsa den. I våras kände jag att jag måste göra slag i saken och äntligen lära mig e-o, inte bara för att stilla min nyfikenhet beträffande brevställaren, utan framför allt därför att jag känner att världen verkligen behöver ett neutralt världsspråk, ett språk som är INGENS och därför ALLAS. Engelskan håller på att ta över och kväva alla andra språk och kulturer, och man måste kämpa emot! Min tanke med att lära mig e-o var naturligt nog redan från början att jag skulle försöka införa esperanto som individuellt val vid vår skola, och skolledningen var genast med på noterna. Nu finns en kurs i "Esperanto 100 timmar" med i kurskatalogen som eleverna skall välja ur inför nästa läsår. 100 timmar innebär ett helt läsår med tre lektionspass i veckan. Av en av mina elever i media-tvåan har jag fått hjälp att göra affischer med reklam för esperanto, affischer som nu skall tryckas och sättas upp på strategiska ställen i skolan. Hur många som kommer att välja e-o i fe-

bruari står ännu skrivet i stjärnorna, men om stjärnorna är gröna, blir det många!

Jag kan nås via den här e-postadressen (på skolan) eller via min hemadress: zms903k@tinet.se

Folke Wedlin

Du kursoj en Uppsala

En septembro 1999 Christer Kiselman kaj Sven Jonsson proponis novan "lokan kurson" al la rektoro de Katedralskolan en Uppsala. Estis kurso de esperanto por komencantoj de 30 gimnaziaj poentoj. Christer skribis kursoplanon kaj pretis esti la instruisto. Sven, kiu jam laboras en Katedralskolan pretis organizi kaj varbi gelnantojn. La propono estis akceptita de la lerneja estraro kaj al la unua informara renkontiĝo la 18an de oktobro, al kiu ni atendis 5-7, venis pli ol 40! Estis gaja surprizo.

Ni dividis la gelnantojn en du grupojn kaj nun ni ambaŭ instruas esperanton al 30 tre lertaj, amuzaj kaj interesitaj gejunuloj. Nia lernolibro estas Jen nia mondo kaj ni ankaŭ uzas kroman materialon, kiun produktas ĉefe Christer.

Ni esperas, ke kelkaj el ili volas daŭrigi post tiuj 30 horoj, kaj en la aŭtuno ni planos oferti novan kurson por komencantoj.

Kelkaj esperantistoj jam gastigis niajn grupojn, kaj nun la gelnantoj volas korespondi, prefereble retpoŝte – se iu leganto konas junan korespondemulon, bv. sciigi nin:

Sven.Jonsson@Katedral.se
kiselman@math.uu.se

Sven Jonsson

Esperanta infan-edukado

Mi havas sesjaran filinon, al kiu mi ĉiam parolis/parolas esperante. La vorto "denaskismo" dum lastaj jaroj ricevis specialan signifon. Denasko ja nur signifas de nasko, sed en la nuntempa esperantomondo la vorton denaskulo oni uzas pri infanoj, kiuj jam de sia unua tempo sur nia globo

lernas esperanton. Lerni du lingvojn denaske povas temi pri iuj ajn lingvoj, kaj ankaŭ eldoniĝis libroj pri dulingvismo dise en la mondo. Denaska esperantoedukado tamen estas io speciale interese por ni esperantistoj, ĉar jam Zamenhof skribis pri la granda signifo por la esperantomovado kiam esperanto fariĝos hereda lingvo.

Ĉiam ekzistis unuopaj esperanto-familioj kun infanoj, kiuj denaske lernas esperanton, sed la streboj nun estas pli firmaj. En UEA estas instanco Rondo Familia, kiu zorgas pri esperantofamiliaj aferoj kaj precipe pri denaskuloj. Ĝi eldonas "Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj", en kiu gepatroj diskutas siajn edukajn spertojn. Grava helpilo por la esperantolernado estas la ĉiujara Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, kiun partoprenis filino Marta kaj mi jam trifoje. Unue en Kroatio, kaj la du aliaj renkontiĝoj estis en Hungario kaj Pollando. La 21a REF estis en kastelo de la pola Przytok. Partoprenis 7 familioj. Strange, ke ĉijare venis nur okcidentlandanoj el Francio, Germanio, Nederlando, Belgio kaj Svedio, nur lasttage alvenis hungara familio. Antaŭaj REFoj estis multe pli orienteŭropdominaj.

Mi parolas esperanton al mia filino, sed mi ne devigas ŝin respondi en esperanto, tial ŝi nur hazarde diras esperantovortojn. Sed ĉijare ŝi parolis esperante al esperantoinfanoj kaj al iliaj gepatroj. Por Marta mi laŭtleĝis vicon da esperantobildlibroj. Centfoje ŝi volis aŭdi "La knabino kiu ne volis iri al la infanejo" kaj "La Hokotrolo". Ŝi ankaŭ ŝatas esperantajn infankantojn. Ĉiusomere ŝi ankaŭ renkontas esperantoinfanojn de la familio Svenonius, kiu havas somerrestojn proksime al Gotenburgo, kie Marta kaj mi loĝas. La patrino de Marta ne estas esperantisto.

Jarl Hammarberg

Renkontiĝo kopenhaga

Okazos multe en la jaro 2000. Ni havos ponton inter Malmö kaj Kopenhago. Tion ni nepre utiligu. La danoj invitis nin por renkontiĝo kun demokratistudentoj en Kopenhago la 9-an de februaro. Ni planas grupe viziti Kopenhagon en tiu vespero.

Sten Svenonius (El La Folio 1999/6)

La 24-a Internacia Somera Kurso

Inter la 13-a kaj la 23-a de junio mia nepino Henrietta kaj mi estis lernantoj de la Esperanto-kursejo en Lesjöfors. Mia instruisto estis Nataša Bertse kaj samtempe Bertil Nilsson. La instruistino de Henrietta estis Sara Karlsson, kiu ankaŭ instruis la infanojn la pasintan jaron. La infan-grupo havis 7 lernantojn. La plej juna estis la eta Sara nun ne 4 jaroj. Entute ni estis 33 paroprenantoj el Svedio, Norvegio, Latvio, Litovio, Estonio kaj Irano.

Lennart Svensson, kiu estis bona kuiristo kuiris la manĝaĵojn kune kun Anne-Marie kaj Mille Milianowicz kaj Ketty Sundin. Kiam ili ne havis taskojn en la kuirejo, ili partoprenis la kursojn. La vetero dum tiu tempo ne ĉiam estis bona, sed tamen dum la libera tempo ni promenis kaj banis nin en la najbara lago. La sabaton kaj dimanĉon estis ekskursoj al Mårbacka kaj Rottneros.

Kantoj ĉiun vesperon

Ĉiun vesperon estis diversaj programoj. Nataša kiu estis ege bona kantistino kaj gitarmuzikistino kantis kaj faris la kurspartoprenantojn kantemajn. Pluraj partoprenantoj rakontis pri siaj landoj kaj iun vesperon Sara Karlsson, instruistino de la infangrupo, kune kun la infanoj kantis. La infanoj estas talentaj kaj tre muzikemaj. Olesia Bertse tre bone ludis violonon, kaj la frato Erik ludis fluton kaj Christelle la pianon. Liza Andersson ludis violonĉelon dum Henrietta dancis.

Gebabilistoj, gekrokodilistoj, gelingvomiksistoj – ĉiuj partoprenintoj ŝajnis senti sin hejme kaj akiris novajn geamikojn.

Mi tre ŝatas esti lernantino. La famaj instruistoj tiu ĉi jaro estis Lars Forsman, Bertil Nilsson, Nataša Bertse kaj Sara Karlsson. La nova instruisto estis Ali Khoshamshaban. Mi aŭdis iam ke Arne, mia klaskamarado el Norvegio, diris al Sara Karlsson ke li sentis kvazaŭ li enamiĝis al ĉiuj partoprenantoj. Mi sentis la samon.

Al ĉiuj instruistoj de tiu somera kurso – Mil dankojn por via bonhumoro kaj entuziasmo. Mi amas vin!

Guðrun kaj Henrietta
(Ur La Veka Bulteno 2/1999)

Vita fläckar och trycksvärta

Under Sovjetepoken förekom vita fläckar p.g.a. censur i pressen. För de flesta svenskar var nog t.o.m. våra grannrepubliker i Baltikum vita fläckar. Kerstin Kristoffersson har nu satt på pränt i Skara domkyrkoförsamlingens pastorats nyhetsblad Nya hur man med esperanto kan få färg på de vita fläckarna.

"Min sommar har gett mig möten med människor från andra länder. Jag deltog i somras i en Östersjöveckan i staden Liepaja i södra Lettland. Där tränade vi språket esperanto, var på utfärder hörde mycket sång och musik. Esperanto är ett konstruerat språk, men ändå spritt över världen. Tidigare var Lettland bara en vit fläck på kartan för mig. Nu har jag mött människor där och sett något av landet. Lettland är ett fattigt land. Men mycket sång och musik hjälper att hålla modet uppe.

I TV-program varje dag finns alltid någon barnkör med. Lettland är landet med 2,5 miljoner människor och 1,5 miljoner folkvisor."

Pri UK en Gotenburgo

Jen aktualaj informoj: Ne troviĝas aliaj kandidataj urboj por la jaro 2003, laŭ Osmo Buller ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. La estraro de UEA faros sian formalan decidon en aprilo venontjare. Osmo Buller vizitos Gotenburgon dum la vintro por informiĝi pri la urbo kaj negoci kun reprezentantoj por Göteborg & Co., la komunuma firmao por aranĝado de foiroj kaj kongresoj.

La UK-grupo renkontiĝas ĉiun mardon dum paraj semajnoj 17.30 – 19.00. Krom planado por eventuala kongreso ni ankaŭ diskutas Esperanto-informadon ĝenerale, surbaze de la libro "Esperanto sen mitoj" de Ziko Marcus Sikosek. Ni ankaŭ planas organizi semajnfinajn kursojn dum la printempo.

Christer Lörmemark
(El Inter-ligilo 4/99)

NEKROLOGOJ

Erik Johansson

Erik Johansson (1908-1999) forpasis 31-an de aŭgusto pasintjare en Gotenburgo, Svedio. Li esperantiĝis jam junaĝe kaj estis aktiva en pluraj esperantokluboj, i. a. dum pluraj jaroj kiel prezidanto de la gotenbarga sekcio de KELI kaj ankaŭ kiel prezidanto en 1977-82 de Esperanto-Societo de Gotenburgo. Li renkontis sian nederlandan edzinon Jo en esperantokongreso.

Andreas Nordström
sekretario de Esperanto-Societo de Gotenburgo

Ulf Ribers

Kun granda dankemo ni memoru pri Ulf Ribers, kiu trankvile por ĉiam endormiĝis la 20an de oktobro en Motala. Miaj kontaktoj kun Ulf ko-

menciĝis, kiam li demandis, ĉu mi pretus esti inter la kunfondontoj de de li planita eldonejo, precipe por la eldono de porinfana literaturo. Mi akceptis, kaj tre baldaŭ la laboro komenciĝis kun Ulf kiel administranto kaj ĉionfaranto, ĝis decembro 1998, kiam la eldonejo ĉesis ekzisti.

Ideoj pri eldonindaj verkistoj neniam mankis al Ulf. Tiel ni nun, dank'al lia iniciatemo kaj amo al la internacia lingvo, havas ne nur la kvin PLUPO-librojn, sed ankaŭ Pipi Ŝtrumpolonga, Ture Sventon en Londono, Emilo de Smolando kaj la Knabino kiu ne volis iri al la infanejo. Por nur mencii la eble plej gravajn eldonaĵojn. Senlace Ulf elpensis novajn vojojn por vendi niajn librojn. Ne ĉiam estis facile, ĉar la merkato de porinfana literaturo en esperanto ja estas limigita. Tamen, ne forgesu, kiu ebligis kaj serĉu tiujn librojn.

Anna-Maria Lange
(iama prez. de Progreso Eldonejo en Motala)

Full fart framåt igen

Esperanto-Gårdens styrelse har haft två sammanträden efter höstens stämma och konstituering i Lesjöfors. Två viktiga beslut har fattats, förutom förstås en rad av mindre betydelse och en rad rutinmässiga. I Göteborg i januari träffades preliminärt beslut om installation av en värmepump. Den fungerar i korthet så att den tar värme ur jorden eller berget, värme som i en pump "pumpas upp" ifrån några få plusgrader till tillräcklig temperatur för uppvärmning och varmvatten. Värmepumpen drivs av el och förbrukar ungefär en tredjedel så mycket el som det skulle gå åt att värma med el.

Styrelsens avsikt är att fatta beslut de sista dagarna i januari.

Anläggningen kommer att kosta bortemot 350 000 kronor, vilket naturligtvis är mycket pengar. Men redan första året beräknas den ge besparingar i 50 000-kronorsklassen. Enligt ett företag som räknat på anläggningen skulle vi spara 1,5 miljoner kronor under 20 år, med nu gällande förutsättningar. Och ingen räknar väl med att oljan långsiktigt blir billigare.

Esperanto-Gården har fått ut resterande del av ett glesbygdsstöd på 200 000 kronor, som länsstyrelsen med EU:s stöd beviljat för att två Lesjöforsbor ska kunna få sin utkomst. Mycket har gått åt till inventarier och till att få fastigheten i gott skick (fast en hel del återstår att göra!) och den egna kassan räcker inte till. Esperanto-Gården måste låna. Och helst räntefritt.

Styrelsen beslutade därför att vända sig till medlemmarna för att låna och dessa pengar öronmärks för just energisparandet. Så snart installationen är klar och energiräkningarna minskar ska återbetalningarna börja. Om banklån med räntekostnader måste tas till så ska dessa väl återbetalas först. Men styrelsen har inte räknat med att sådana lån ska behövas. Medlemslånen återbetalas i den ordning de tecknats och mellan 50 och 100 procent av beräknade inbesparingar återbetalas årligen.

Ändå ska ingen behöva avstå från att hjälpa till med lån på grund av ovisshet om när i framtiden pengarna kan behövas för egen del. Envar långivare har rätt att med tre månaders varsel få sitt lån återbetalt.

Därför har också varje lån begränsats till maximalt 10 000 kronor. (Men man får teckna flera lån.) (Någon minut efter att detta var beslutat var de första 51 000 kronorna tecknade av några av de närvarande.)

Matsservering

Under sitt tidigare möte i oktober i Stockholm beslutade styrelsen att ingå avtal med Lennart Svensson om värdskap för vandrarhemmet och arrende av matsserveringen på Esperanto-Gården. Avtalet utarbetades av den arbetsgrupp som årsstämmans tillsatte.

Matsserveringen bedöms som helt nödvändig för att kunna använda anläggningen som kurs- och konferensanläggning. För att kunna servera ett stort antal gäster krävs ett välutrustat kök, vilket Esperanto-Gården nu har.

Men inte ens med de nu beslutade investeringarna blir allting klart.

Flera åtgärder står på väntelistan. Dessvärre har en läcka uppstått i

taket, som kommer att repareras så snart vintern är över. På lite längre sikt kan det nog bli nödvändigt att lägga om taket helt på en del av byggnaden. Stämningen är i alla fall optimistisk. Gäster strömmar till i vandrarhemmet. Och till sommaren blir det två egna arrangemang. Först midsommarfirande och i andra halvåret av juli kommer sedan sommarkursen, där man kan delta en eller två veckor.

Vid stämman i höstas hade två styrelseledamöter avböjt återval: Märtha Andreasson och Kaisa Hansen avtackades. Nyvalda blev Birger Vigen och Bengt Nordlöf. Nya suppleanter blev Anita Dagmarsdotter och Bertil Nilsson.

Bengt Nordlöf

Ny matsservering

Den 1 februari startar Lennart Svensson matsservering i Esperanto-Gården med preliminärt namn "Lejsjöfors Bon'Apétito Matsservering".

ENERGISPARLÅN

Undertecknad vill bidra med ett lån till Esperanto-Gården för installation av värmepump. Denna beräknas halvera värmekostnaden som nu genom oljeeldning är ca 90.000 kronor per år. Jag är medveten om att lånet löper räntefritt och att lånen återbetalas i tur och ordning som de tecknats och att minst hälften av de inbesparade pengarna återbetalas årligen. Jag har dock rätt att när som helst, efter tre månaders skriftlig uppsägning, få lånet återbetalt.

Jag tecknar mig härmed preliminärt för ett energisparlån på _____ tusen kronor.

Namn: _____

Adress: _____

Postnr o ort _____

Tel: _____ E-post _____

Talongen sänds till
Esperanto-Gården, styrelsen
680 96 Lesjöfors

Nihon-go-o hanashimasu ka?

Iu diris ke la japana estas la plej malfacila lingvo en la mondo. Tion estas malfacile juĝi, sed certe ĝi havas kelkajn grandajn malfacilaĵojn sed el aliaj vidpunktoj ĝi estas facila kaj logika. Kaj kelkloke ĝi memorigas pri esperanto.

Lingvo sen parencoj

La japana lingvo ne apartenas al iu speciala lingvofamilio kaj ĝi ne havas proksimajn parencojn (kvankam kelkajn trajtojn ĝi havas komune kun la korea lingvo). Oni kredas ke ĝia origino estas ie en centra Azio.

Facila elparolo

La elparolo ne estas malfacila por eŭropano. Ne estas malfacile elparol-eblaj sonoj aŭ sonkombinoj. Akcento ne multe gravas, sed oni devas distingi inter longaj kaj mallongaj sonoj, kaj ĉe konsonantoj kaj ĉe vokaloj.

La eŭropa "r" mankas kaj la sonoj "r" kaj "l" reprezentas por la japano la saman literon. Same estas pri "b" kaj "v". Eĉ la plej sperta japano kelkfoje eraras kiam li parolas fremdan lingvon, kaj intermiksas la sonojn. Se japano diras al vi ion kion vi ne komprenas, provu interŝanĝi "r" kaj "l" aŭ "b" kaj "v"!

(Ni svedoj ne ridu pri la japanoj ĉar ni ja mem havas saman problemon pri "s" kaj "z"!)

La japanaj vortoj konsistas el silaboj, kaj ĉiu silabo konsistas el unu vokalo aŭ unu konsonanto + unu vokalo. *n* estas la nura konsonanto kiu povas ekzisti sola sen sekva vokalo. Kiam japano transkribas fremdan vorton per sia alfabeto li enŝovas vokalojn *o* aŭ *u* tiel ke ekzemple "Stockholm" fariĝas *Sutokuhorumu* kaj "esperanto" fariĝas *esuperanto*. Elparolante la sperta japano denove forigas la enŝovitajn vokalojn aŭ tre malforte prononcas ilin. Sed la sistemo ne ĉiam perfekte funkcias. Tial vi kelkfoje renkontas japanojn kiuj parolas pri la lingvo *esperant*.

Lingvo kun tri alfabetoj (aŭ kvar)

La japana lingvo havas tri diversajn alfabetojn, ĉiujn oni importis antaŭ longa tempo el Ĉinio. Sed krome oni ofte trovas en japanaj tekstoj esprimojn kaj mallongigojn skribitajn per eŭropaj literoj.

Du japanaj alfabetoj estas fonetikaj kaj enhavas literojn por skribi la 46 sonkombinojn kiuj estas eblaj en

la japana lingvo. Unu, *hiragana*, estas uzata por skribi japanajn vortojn kaj gramatikajojn; la alia, *katakana*, estas uzata por skribi fremdajn vortojn.

La alfabetoj ja estas fonetikaj. Lern-inte la literojn oni povas taŭgete laŭtlegi.

La tria alfabeto estas la granda ĉagreno por lernanto de la japana lingvo. Ĝi konsistas el miloj kaj miloj da ĉinaj *kanji*-signoj, do malgrandaj bildoj faritaj per unu ĝis kelkdekoj da strekoj. Por legi ordinaran tekston en gazeto "sufiĉas" scii 1850. Japanaj infanoj komencas lerni la signojn en la elementa lernejo kaj kiam ili finas la mezlernejon ili estas lernintaj ilin

...Ordinara eksterlanda studanto kiu eble ne scias pli ol cento da *kanji*-signoj (kaj rapide forgesas ilin) trovas ke li estas analfabeto en la japana mondo! Kutime estas ja pli facile legi fremdan lingvon ol paroli ĝin sed pri la japana estas male!

La situacio de la studanto ne estas helpata de la fakto ke la japanoj skribas la tekston sen interspacoj tiel ke oni ne scias certe kie estas la fino de unu vorto kaj la komenco de la alia!

Alia problemo: ĉiu *kanji*-signo povas esti legata aŭ laŭ ĉina prononco aŭ laŭ japana prononco. Do por ĉiu *kanji*-o estas du alternativaj tute diversaj elparoloj kaj oni neniam scias kiun uzi kiam.

Por elparoli *kanji*-on oni devas scii ĝin aŭ trovi ĝin en vortaro. Kaj serĉi *kanji*-signon en vortaro estas granda scienco en si mem. Oni devas analizi la signon, rekoniti ĝiajn elementajn partojn, la tielnomitajn radikalajn, kaj oni devas nombri strekojn. Nuntempe ekzistas perkomputilaj vortaroj kiuj iomete faciligas la serĉadon.

La tradicia japana skribmaniero estas de supre malsupren, de dekstre mal-dekstre, sed oni povas ankaŭ skribi kiel en la eŭropaj lingvoj, de mal-dekstre dekstre, de supre malsupren. Ĉiu litero okupas same grandan spacon sendepende de ĝia komplekseco.

Japana teksto estas tre koncentrita: oni vere ŝparas paperon; se vi tradukas unu paĝon da japana lingvo vi havos tri aŭ kvar paĝojn da eŭropa lingvo. Sed la tempo tralegi la tekston estas proksimume sama.

Redundanco mankas

Ni jam vidis ke la eblaj sonkombinoj estas malpli ol en eŭropaj lingvoj. Kaj

kutime la vortoj estas malpli longaj. Sed la tuta vortprovizo estas same granda. La rezulto estas ke multaj vortoj estas tre similaj unu al la aliaj, ofte la diferenco estas nur unu sono. Redundanco mankas. La japanan lingvon oni devas paroli relative perfekte aŭ oni tute ne estas komprenata. Se vi parolas ekzemple svede malbone, sonas ridinde, sed oni plej ofte tamen komprenas kion vi volas diri. Sed en la japana vi diras tute aliajn vortojn. Mi iam provis traduki tiun skeĉon de Hasse kaj Tage "Det var en gång en gube" ("Iam estas maljunulo") sed la japana signifo fariĝis "iam estis onklo" kaj neniu ridis...

Fakte estas multaj japanaj vortoj kiuj eĉ ne per unu sono distingas sin. Ili sonas idente same; ili estas homofonoj. La sola maniero distingi inter ili estas la *kanji*-signoj. Kelkfoje dum konversacio oni vidas japanon per sia fingro desegni *kanji*-signon en sia manplato por indiki al la kunparolanto kiun vorton li celas.

Diversaj parolmanieroj

Oni uzas aliajn vortojn kaj gramatikon kiam oni parolas kun siaj familianoj kaj kiam oni parolas kun siaj superuloj kaj kiam oni parolas neŭtrale kun fremduloj. La diferencoj estas tiom grandaj ke preskaŭ temas pri malsamaj lingvoj.

Estas ankaŭ diferencoj inter la lingvo-uzo de viroj kaj virinoj. Okazas kelk-foje ke eŭropa edzo kiu lernis la japanan lingvon de sia edzino trovas ke li parolas japane laŭ virina maniero.

Simpla gramatiko sen malregulaĵoj

Substantivoj:

Difina kaj nedifina artikoloj mankas. (Ili ne estas tiom necesaj kiom ni okcidenteŭropanoj kredas.)

Ne estas diversaj genroj kaj ne estas pluralo. Oni povas fari ian pluralon dirante la substantivon dufoje, sed ĝi havas la signifon "ĉiuj".

ekzemplo:

yama = (la) monto (-j)

yama-yama = ĉiuj montoj

Adjektivoj kaj adverboj:

La veraj adjektivoj finiĝas per *-i*.

-ku funkcias same kiel -e en esperanto por fari adverbbon el adjektivo

ekzemplo:

hayai frua;rapida hayaku frue;rapide

Verboj:

Jen kelkaj verbformoj (samaj por ĉiuj personoj en singularo kaj pluralo):

estanta tempo (aŭ estonta, precipe se oni indikas per iu adverbo, ekzemple *sugu* (tuj) aŭ *ashita* (morgaŭ)):

tabemasu manĝas/-os
hanashimasu parolas/-os

tabenmasen ne manĝas/-os
hanashimasen ne parolas/-os

estinta tempo:

tabemashita manĝis
hanashimashita parolis

tabemasen deshita ne manĝis
hanashimasen deshita ne parolis

Gerundio estas verboformo kiu en kombino kun *kudasai* (bonvolu) funkcias kiel imperativo:

tabete kudasai bonvolu manĝi
hanashite kudasai bonvolu paroli

Partikuloj:

Same kiel esperanto la japana estas aglutina lingvo. Tio signifas ke la aldono de finaĵoj kaj afiksoj ne ŝanĝas la radikon de la vorto. La japana uzas partikulojn por indiki la diversajn frazelementojn, ekzemple:

-*wa* indikas pri kio temas, do kutime la subjekton. Ofte oni tute ellasas la subjekton se ĝi estas la sama kiel en la antaŭa frazo.

-*o* indikas la akuzativobjekton

-*ni* indikas (interalie) la dativobjekton

-*de* indikas (interalie) la lokon kie io okazas

-*e* indikas direkton

-*no* funkcias same kiel -a en esperanto: per ĝi vi povas fari adjektivojn le substantivoj, fari posesivajn pronomojn, genitivon.

Kelkaj ekzemploj:

watashi-wa resutoran-de biiru-o nomimasu.

mi (subjekto) restoracio (loko) biero (akuzativo) trinkas

Mi trinkas bieron en restoracio

tomodachi-wa biiru-o nomimasen
amiko (subjekto) biero (akuzativo) ne trinkas

La amiko ne trinkas bieron.

tanaka-san-wa honya-de watashi-ni nihon-no shinbun-o kaimashita.

Tanaka s-ro/s-ino (subjekto) librejo (loko) mi (dativo) Japanio (adjektivo) ĵurnalo (akuzativo) aĉetis

S-ro/s-ino Tanaka aĉetis al mi japanan ĵurnalon en la librovendejo.

ashita tomodachi-wa sapporo-e ikimasu.

morgaŭ amiko (subjekto) Sapporo (direkto) iras.

Morgaŭ la amiko iros al Sapporo.

La verbo venas laste. Atentu ke vi devas atendi ĝis la lasta silabo de la propozicio por ekscii ĉu ĝi estas jesa aŭ nea.

ka post la propozicio signalas ke ĝi estas demando.

soo desu ka tiel estas (demando)

Ĉu tiel estas? Ĉu vere?

ne egalas al esperanta "ĉu ne?"

tenki-wa ii desu ne

vetero (subjektivo) bela estas ĉu ne

La vetero estas bela ĉu ne?

Kelkaj vortoj:

doko = kie *koko* = ĉi tie *soko* = tie

dore = kio *kore* = ĉi tio *sore* = tio

dono = kiu *kono* = ĉi tiu *sono* = tiu

donna = kia *konna* = ĉi tia *sonna* = tia

Ĉu vi rekonas la principon?

Vortfarado

Oni kreas kunmetitajn vortojn same facile kiel en esperanto. La japana ankaŭ havas multajn funkciajn afiksojn por doni novan signifon al vorto:

-*mono* egalas al esperanta -aĵo
taberu manĝas *tabemono* manĝaĵo
kairu aĉetas *kaimono* aĉetaĵo
kiru vestas *kimono* vestaĵo

-*jin* indikas persono kaj funkcias kiel esperanta -ulo aŭ -ano
nihon Japanio *nihonjin* japano
esuperanto esperanto *esuperantojin* esperantisto

gai ekster *gaijin* fremdulo, eksterlandano
(infanetoj ridas kaj krias *gaijin* kiam ili vidas eŭropanojn)

-*ya* similas al esperanta -ejo kaj indikas vendejon aŭ:

hon libro *honya* librovendejo
pan pano (pruntvorto el portugala!)
panya panvendejo

Pruntvortoj

La unuaj eŭropaj lingvoj kiuj donis pruntvortojn al la japana estas la portugala kaj hispana, ĉar la unuaj eŭropanoj kiuj venis al Japanio estis portugaloj kaj hispanoj. (La japanoj nomis ilin "la sudaj barbaroj" ĉar ili venis de sudo kontraste al la "nordaj barbaroj" kiuj estis la ainu-popolo loĝanta en la norda parto de la lando.) Nuntempe la plej multaj pruntvortoj devenas de la angla.

La traktado de fremdaj vortoj estas modela. Oni enlasas ilin en la lingvon kaj uzas ilin, sed oni transskribas ilin fonetike (Oni havas ja eĉ specialan alfabeton por tio.) Tiel la fundamentaj japanaj reguloj pri elparolado kaj gramatika fleksado validas ankaŭ por la pruntvortoj, dum ni stultaj svedoj devas ŝanĝi al anglaj prononcreguloj

ĉiufoje kiam ni uzas "pruntvorton" kaj kutime tute ne povas fleksi ĝin.

La transskribado sekvas la elparolon de la japanoj kaj tial oni devas havi iom da fantazio por kompreni prunt-vortojn kiel *miruku* lakto (de angla "milk") *rabu* amo (de angla "love") *konpyuutaa* komputilo (de angla "computer") *barantijaa* volontulo (de angla "volunteer")

Kelkfoje la pruntvorto ne havas la saman signifon kiel en la origina lingvo:

baikingu buterpana tablo, smorgasbordo (de la angla "viking", kiu estis nomo de restoracio)

mai mia privata (de la angla "my")

Japanoj ne ŝatas longajn vortojn kaj tial ili senrespekte fortranĉas la nebezonatan parton de la vorto: *depaato* magazeno (de la angla "department store")

baito (parttempa) laboro (de la germana "Arbeit")

tereĉi televido (de la angla "television")

pasokon PC (de la angla "personal computer")

oke orkestro (de la angla "orchestra")

karaoke estas kunmeto de la japana *kara* (= malplena) kaj *oke*.

Ekzemploj pri japanaj vortoj en Esperanto:

harakiro, *kamikazo*, *kimono*, *sakeo*

Jes aŭ ne?

Certe la japana havas vortojn por jes (*hai*) kaj ne (*iee*). Sed kiam japano respondas demandon, li - tute logike - diras jes aŭ ne por indiki ĉu la frazo en la demando estas prava aŭ ne. Do, se vi demandas "Ĉu vi ne komprenas?" (*wakarimasen ka*) li povos surprizi vin per sia respondo: "Jes (la aserto en via demando estas prava), mi ne komprenas" (*hai, wakarimasen*.)

Kelkaj esprimoj

En mia angla-japana frazaro la dusilaba "Stop thief!" ("Haltigu la ŝtelinton!") estas tradukata per *doroboo-o tsukamaete kudasai*. Esperable tio reflektas malaltan krimfrekvencon en Japanio.

Ĉiu vizitanto en iu lando devus scii kelkajn vortojn:

doozo bonvolu! (kiam oni transdonas ion)

arigatoo dankon! (*doomo arigatoo* estas "multan dankon" kaj en ĉiutaga uzo oni diras nur *doomo* por dankon)

gomennasai pardonu

Ĝis revido estas solene *sayonara* sed en ĉiutaga lingvo oni diras *de wa mata* (Ĝis ree!)

Nils-Erik Kristoferson



La 55-a IJK

Inter la 9a kaj 16a de aŭgusto pli ol 500 junuloj kongresis en la malgranda urbo Veszprém, Hungario, dum la 55a Internacia Junulara Kongreso. La kongresurbo konvene situis proksime de la granda lago Balaton, kiu estis la celo de pluraj ekskursoj.

